

# Esperanto kaj UN

## Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 82, majo-junio 2026



Universala Esperanto-Asocio

## Togolanda ministro fariĝis alta protektanto de la 9-a Afrika Kongreso de Esperanto



Per oficiala letero datita la 18-an de februaro 2026, la Ministro pri Turismo, Kulturo kaj Artoj de Togolando, S-ro Isaac Tchiakpe, akceptis fariĝi la Alta Protektanto de 9-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE), tutkontinenta aranĝo. La oficiala patroneco de la Ministro Tchiakpe ne nur donas al la kongreso diplomatan rekonon, sed ankaŭ konfirmas la malfermitecon de la togolanda registaro al nuntempaj iloj por kultura kaj turisma integriĝo.

La 9-a AKE disvolviĝos la 26-an ĝis la 31-a de decembro 2026 en la pitoreska urbo Kpalime. Konata pro siaj verdaj montoj, vigla arta sceno kaj gastama loĝantaro, la kongresurbo estas konvena loko por gastigi la partoprenantojn el la tuta afrika kontinento kaj de aliaj partoj de la mondo. Sub la temo "Esperanto, lingva ponto por senlima Afriko", la 9-a AKE celas esplori kiel la internacia lingvo povas: a) faciligi la komunikadon inter afrikanoj de diversaj lingvaj fonoj; b) konigi kaj valorigi la togolandan kulturon kaj turismon al internacia publiko kaj c) subteni la vizion de unuigita, senlima kaj kunlaboranta Afriko.

En mondo, kie lingvaj baroj ofte malhelpas ekonomian kaj kulturan interŝanĝon, la elekto de Togolando kiel gastiganto de la tutkontinenta evento poziciigas la landon kiel unu el la avangardaj centroj en Afriko por neŭtrala kaj egalececa komunikado, kaj celas honori enlandajn aktivulojn, reliefigi la turisman potencialon de la lando kaj montri la gastamon de la popolo.

Okazanta regule por plifortigi la ligojn inter la diversaj landaj asocioj, kluboj, kaj unuopuloj, kaj por prezenti la progreson de la lingvo en Afriko, la Afrika Kongreso estas la plej grava renkontiĝo de la afrika Esperanto-movado. Ĝi tradicie kunvenigas partoprenantojn el dudeko da landoj de pli ol unu kontinento.

La ĉiujara monda kongreso de UEA, la Universala Kongreso de Esperanto, okazis en Aruŝo, Tanzanio, en 2024. UEA havas membrojn en preskaŭ ĉiuj afrikaj landoj.

## Multlingvismo en Unuiĝintaj Nacioj: Kerna valoro aŭ kerna elspezo?

Kunveno pri lingvoj kaj lingvistiko, okazinta la 24-an de aprilo, kunigis inter sesdek kaj sepdek partoprenantojn, plejparte anojn de la lingvaj servoj de UN kaj aliajn profesiulojn, por pridiskuti la nunan staton de multlingvismo en UN.

La sesio, kunvokite de la Organizo Internacia de la Frankofonio (OIF) kaj la Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj, estis prezidata de Profesoro Francis M. Hult, kaj finajn rimarkojn liveris Profesoro Humphrey Tonkin, kiuj ambaŭ reprezentas Universalan Esperanto-Asocion apud Unuiĝintaj Nacioj.

Ĉefparolantoj estis Ambasadoro Michel Xavier Biang, de La Frankofonio, kaj Ambasadoro Joan Forner Rovira, de Andoro, kiu ankaŭ prezidas la Grupon de Amikoj de Multlingvismo en UN. Granda parto de la konversacio rilatis al la financa krizo en UN kaj la sekva minaco al lingvaj servoj. Ankaŭ traktataj estis la pozitivaj kaj negativaj de Artefarita Inteligento, kaj la demando de lingvo kaj homaj rajtoj. Pli ampleksan Simpozion pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj oni nun planas por vendredo, 8 majo.

## Junaj esperantistoj mesaĝis okaze de la Internacia Tago de Edukado

“La Internacia Tago de Edukado, festata ĉiujare la 24-an de januaro, estas altvalora okazo por pripensi la fundamentan efikon kiun edukado havas sur individuojn kaj sociojn,” deklaris TEJO, la internacia organizo de junaj Esperanto-parolantoj, okaze de la Internacia Tago de Edukado la 24-an de januaro 2026.

“Edukado ebligas emancipiĝon, kritikan pensadon kaj kreivon,” asertis la deklaro. “Ĝi estas baza ŝtono de disvolviĝo por ĉiu komunumo, malfermante la vojon al justaj merkatoj kaj pacaj socioj. Sed en ĉi tiu diversa mondo, kie pli ol 7 000 lingvoj estas parolataj, ekestas decida demando: kiel konstrui pontojn por inkluziva komunikado inter ĉiuj homoj? Jen kie Esperanto, la konstruita lingvo plej parolata en la mondo, ludas gravan rolon.”

“Esperanto estas pli ol nur simpla lingvo; ĝi estas vera ilo por interkultura edukado. Per ĝia uzo, studentoj lernas ne nur lingvajn kapablojn, sed ankaŭ valorojn de empatio, solidareco kaj reciproka respekto. Lerni Esperanton signifas partopreni en inkluziva aliro, kiu festas diversecon kaj samtempe kreskigas spacon por dialogo kaj interŝanĝo.

“En klasĉambroj en kiuj oni instruas Esperanton, studentoj havas la ŝancon interagi kun siaj kolegoj el diversaj landoj, tiel riĉigante sian komprenon pri la mondo kaj tutmondaj problemoj. Ĉi tiu praktiko kreskigas senton de tutmonda komunumo kaj preparas junulojn por iĝi kosmopolitaj civitanoj, konsciaj pri la riĉeco kiun reprezentas la kultura diverseco.

“En ĉi tiu Internacia Tago de Edukado, ni memoru, ke aliro al altkvalita edukado devas esti rajto por ĉiuj, sendepende de ilia lingva aŭ geografia fono. Integrite Esperanton en instruplanojn, ni ne simple antaŭenigas lingvon; ni konstruas pontojn al reciproka kompreno kaj kunlaboro inter nacioj.

Tial, ni engaĝiĝu igi edukadon alirebla kaj egala por ĉiuj, uzante Esperanton kiel apogilon por socia ŝanĝo. Kune, ni vidu la defiojn de nia tempo kiel ŝancojn por lernado kaj interŝanĝo, kaj festu la potencon de edukado por transformi vivojn kaj konstrui pli bonan mondon.”

## Aŭstrio agnoskis Esperanton kiel lingvon de kulturo kaj nemateria heredaĵo

Per oficiala anonco la 16-an de aprilo, la Aŭstra UNESKO-Komisiono formale agnoskis Esperanton kiel parton de la nemateria kultura heredaĵo de Aŭstrio:

<https://www.unesco.at/presse/artikel/article/vier-neue-eintragungen-im-nationalen-verzeichnis-des-immateriellen-kulturerbes>

Laŭ vicprezidanto de UEA Seán Ó Riain, respondeca pri eksteraj rilatoj de UEA, temas pri “brila novaĵo, kiu tute kongruas kun la strategio de UEA por la Esperanto-movado – kaj nur kelkajn monatojn antaŭ la 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graco”. Post Pollando (2014) kaj Kroatio (2019), Aŭstrio estas la tria lando, kiu faris ĉi tiun paŝon. Laŭ Ó Riain “unu el la ĉefaj antaŭjuĝoj de kontraŭuloj de Esperanto estas, ke ‘ĝi ne havas kulturon’. Ĉi tiu formala agnosko de la kultureco de Esperanto fare de tri landoj nuligas ĉi tiun antaŭjuĝon. La Eŭropa Komisiono agnoskis tion, kun praktikaj sekvoj. Ĝi nun subtenos Esperanton same kiel ĝi subtenas aliajn ne-oficialajn lingvojn, kiel ekzemple la katalunan, la eŭskan, la bretonan ktp”.

UEA dankis ĉiujn aŭstrajn kaj ne-aŭstrajn Esperanto-parolantojn kiuj kontribuis al ĉi tiu sukceso, kiun UEA akompanis kaj subtenis dum la tuta procezo. La Estraro de UEA esperas, ke tio stimulos esperantistojn en aliaj landoj klopodi atingi similan nacian agnoskon, precipe en najbaraj landoj kiel Litovio, Hungario kaj Italio, sed ankaŭ alikontinente.

Speciala momento por noti tiun agnoskon kaj instigi pliajn similajn paŝojn en aliaj landoj okazos en la 111-a Universala Kongreso (1-8 aŭgusto 2026). (<https://uk.esperanto.net>.)

## Esperanto kiel internacia literatura lingvo: Memore pri du elstaraj figuroj

2026 markas respektive 50 kaj 20 jarojn post la forpasoj de la húngaro **Kálmán Kalocsay** (1891–1976) kaj la skoto **William Auld** (1924–2006), du el la plej influaj poetoj, tradukistoj kaj kulturaj organizantoj en la historio de Esperanto. Okaze de tiu datreveno Universala Esperanto-Asocio (UEA) lanĉis la iniciatojn **#Kalocsay50** kaj **#Auld20** por instigi la realigon de serio de kulturaj agadoj tra la jaro omaĝe al la poetoj kaj iliaj verkoj kaj heredaĵoj.

La Internacia Lingvo Esperanto havas riĉan literaturon, originalan kaj tradukitan, de aŭtoroj el ĉiuj kontinentoj. Aperis tra la jaroj miloj da libroj kaj centoj da literaturaj revuoj. Zamenhof mem, la kreinto de la lingvo, tradukis interalie *Hamleton* de Shakespeare kaj la tutan Malnovan Testamenton. Li verkis originalan poezion en Esperanto. Tiaj verkoj ne nur estis valoraj en si mem sed ankaŭ helpis formi kaj kompletigi la lingvon.

Kalocsay estis ne nur elstara poeto, sed ankaŭ stilnormiganto. Lia redaktado de la revuo *Literatura Mondo* en la intermilita periodo en Hungario markis epokon en la evoluo de la Esperanta literaturo. Per siaj tradukoj de mondliteraturaj klasikuloj kaj per sia propra poezio li montris la esprimkapablon de Esperanto je plej alta arta nivelo. Samtempe li aktive laboris por videbligi aliajn verkistojn kaj por konstrui en Esperanto ampleksan panoramon de la kultura vivo (kion simile faris ankaŭ Auld).



Februaro 2026 markis 50 jarojn post la forpaso de Kalocsay. Tra la monato, Fernando Maia, Prezidanto de UEA, prezentis specialan programon pri Kalocsay kaj Auld en la 10-a Kuba Esperanto-Renkontiĝo, en Havano. La Esperanto-klubo de Debrecen, Hungario, renkontiĝis ĉe la Biblioteko Méliusz por speciala programo, kaj, en Budapeŝto, reprezentantoj de hungaraj Esperanto-organizaĵoj kaj UEA omaĝis al Kalocsay per publika ceremonio ĉe la memortabulo sur lia iama loĝdomo: strato Nyúl n-ro 4.

UEA instigas asociojn kaj ĉiujn Esperanto-grupojn kaj individuojn entrepreni tra la jaro renkontiĝojn kaj diverstipajn okazojn por omaĝi, memori kaj ĉefe studi la vivon kaj verkojn de Kalocsay. “Kalocsay estas



konata kiel poeto kaj tradukisto, sed lia talento estis eĉ pli vasta: li ankaŭ interesiĝis pri muziko kaj eĉ komponis por kelkaj el siaj poemoj kaj tradukaĵoj. En 2026 ni volas montri Kaloĉaĵon ne nur kiel gravan historian figuron, sed kiel vivan inspirfonton por kreado kaj kleriĝo, por plu sonigi la esperantan kulturon al la nunaj kaj novaj generacioj”, komentis Zdravka Boytcheva, estrarano de UEA pri kulturo.

Antaŭvidataj pri #Kalocsay50 kaj #Auld20 estas programeroj en la 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Graco, Aŭstrio (1-8 aŭgusto). La revuo *Literatura Vivo*, kun kiu UEA kunlaboras, lanĉis specialan literaturan konkurson [Kalocsay](#).

Agado pri #Auld20 baldaŭ komenciĝos kaj daŭros en la venontan jaron. Same kiel Kalocsay, Auld estas konata kiel granda figuro de la poezio, sed ankaŭ kiel elstara verkanto pri la lingvo Esperanto. Lia epopea verko *La infana raso* estas ĉefverko de la lingvo, kaj lia *Esperanta antologio* proponas panoramon de la poezio en Esperanto. Li estas konata kiel tradukanto de Ŝekspiro, de Tolkien kaj de abundaj aliaj. Li estis kelkfoje proponata kiel kandidato por la Premio Nobel pri literaturo.

---

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto-Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. [www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org).